ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisionde UEA

18- a jaro, N-ro, 49(2024 : 04)

# ENKONDUKO

Karaj legantoj,

Ni tre ĝojas ankoraŭfoje prezenti al vi la novan numeron de ĉi tiu Bulteno, kiu venas al vi por informi vin pri diversaj okazaĵoj pri la esperanto-movado en Afriko.

Kiel vi ĉiuj scias, la jaro 2024 estas escepte tre simbola kaj memorinda en la agendoj de ĉiuj afrikaj esperantistoj, ĉar ĝi estas la jaro dum kiu la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Afriko por la unua fojo.

En ĉi tiu numero vi trovos gravajn informojn pri diversaj agadoj, eventoj, kaj novaj planoj pri la ĉi-jara Universala Kongreso okazonta en la turisma urbo (Aruŝo) de la plej paca lando, kies iama ĉefurbo "Dar-es-alaam" signifas en Esperanto "Domo de paco"; ĝi estas sendube Tanzanio!

Krome, ni tre sincere dankas vin pro via subteno ĉiama al la movado en Afriko, kaj esperas (re)vidi vin en Aruŝo por kune grimpri la plej altpintan monton en Afriko apud la unua plej bela parko en Afriko. Enkovrante multajn mirindaĵojn, kiujn viaj propraj okuloj aprezos sur loke, ni lasas al vi la elekton plej bonan kaj taŭgan pri via tuja aliĝo al la Universala Kongreso de Esperanto 2024, vi trovos sube aliĝilojn!

Elkore dankas,

**La redakcio.**

******************************************************************************

# ENHAVOTABELO

ENKONDUKO....1
ENHAVOTABELO....2
MESAĜO DE LA ESTRARANO DE UEA PRI AFRIKO....2
BONA NOVAĴO AL KONGRESANOJ....4
ALVOKO....7
AL MONTO-GRIMPANTOJ....8
Internacia Infana Kongreso....8
LA DUA BULTENO DE LA 109-A UK EN ARUŜO HAVEBLAS RETE....9
AGADO EN KONGO DR....11
VIRINOJ EN KINŜASO....11
AFRIKA KONGRESO DE VIRINOJ....12
PRI NIA KOTIZO :....12
ALIĜILO Al la....13
KRISTANA SEMINARIO EN MADAGASKARO....14
Nia programo....15
KLERIGA PRELEGO DUM KLUBA VIVO....19

# MESAĜO DE LA ESTRARANO DE UEA PRI AFRIKO

Karaj samkontinentanoj, karaj legantoj,

Saluton,



Esperanto eniris Afrikon antaŭ multaj jaroj kaj de jaro al jaro nia movado plifortiĝas. Unue venigis la lingvon en Afrikon Eŭropanoj, kaj poste afrikaj pioniroj, transprenis kelkajn taskojn.

Mi certas ke kelkaj el vi daŭre tenas la torĉon kaj pro tio ni nun povas legi ĉi bultenon. En 1999, kiam mi esperantistiĝis, mia instruisto diris al mi ke Esperanto malfermos miajn okulojn. Tiam, mi ne povis kompreni kion li celis, sed poste kiam mi eniris la movadon, mi komprenis kion li aludis. Esperanto vere malfermis al mi ne nur miajn okulojn, sed multajn pordojn. Mi nun havas kontaktojn en pluraj landoj, mi povas rekte informiĝi pri kio okazas en aliaj landoj tra diversaj forumoj aŭ ret-grupoj kaj ankaŭ mi povas doni mian kontribuon en tre bona harmonio.

Karaj, 2024 jaro estas historia jaro por Afriko, kaj ankaŭ por la esperantistaro. Vi ĉiuj jam aŭdis ke UK okazos en Afriko por la unua fojo. Porinforme, jam okazis 108 Universalaj kongresoj sed en tiuj 108 UK-j, Afriko neniam organizis ĝin, do jen bela okazo por vi partopreni la Universalan Kongreson. Multaj ŝparis monon en la pasinteco, por partopreni UK-n, sed ne sukcesis ĉar antaŭ siaj vojoj stariĝis multaj baroj. Nun ĝi okazos en Afriko, kie ne estas multaj baroj. La estraro kaj la esperantistaro konscias pri la situacio je kiu ni travivas kaj pro tio estas klopodoj partoprenigi multajn aktivulojn al ĉi prestiĝa kaj historia evento. La estraro konscias ke ne havas sencon kongresi en Afriko sen afrikanoj, sed necesas ke ni montru ke vere ni estas subtenindaj, ke ni ne estos nur observantoj dum la kongreso, sed ankaŭ agantoj, kontribuantoj. Ni montru niajn talentojn, kion ni povas fari por ke ekster-

afrikanoj havu impreson pri la afrika movado kaj eĉ planu reveni kadre de lokaj eventoj.

Karaj, foje ni diras “Niaj nepoj benos nin”, ĉu ne ? Sed ĉu ĉiuj esperantistoj estos benindaj? Certe, niaj nepoj ne benos nin se ni nenion lasos al ili. Ni devas lasi rakontindan historion, subteni al novuloj kaj bone gardi kion ni akiris dank’al Esperanto. Ni ne devas kvereli pro pozicioj aŭ defendi niajn ideologiojn, sed ni devas harmonie kunvivi, niaj diferencoj estu niaj fortoj. Kiel vi scias, koloniistoj misuzis niajn diferencojn por dividi nin. Ni lasu la pasintecon kaj konsideru la estontecon. Ankoraŭ estas multaj belaj aferoj antaŭ ni, kaj se ni vere volas ricevi benojn de niaj nepoj, ni eklaboru nun kaj lasi bonan historion en la esperanto-movado.

Por fini, mi gratulas al la afrika komisiono kaj al ĉiuj aktivuloj, kiuj sindonas por ke nia lingvo disvastiĝu. Okazas multaj kursoj kaj multaj interesaj aktivaĵoj en Afriko kaj ni pretas diversmaniere helpi al aktivuloj agadi. Ne hezitu ĉiam kontakti la afrikan komisionon por konsiloj.

Vivu Esperanto en Afriko,

Vivu UEA.

Dankon

**Jérémie SABIYUNVA,**
**Estrarano de UEA.**

# BONA NOVAĴO AL KONGRESANOJ

### LA 109-A UK: ETHIOPIAN AIRLINES OFICIALA FLUGKOMPANIO, ANTAŬ- KAJ POST-KONGRESAJ EKSKURSOJ KAJ ALIAJ GRAVAJ INFORMOJ POR VENI AL ARUŜO

Ethiopian Airlines fariĝis sponsoro kaj la oficiala flugkompanio de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Kadre de tiu partnereco la flugkompanio proponas 15%-an rabaton ĉu por komerca ĉu por ekonomia klasa tarifo por ĉiuj kongresanoj flugontaj de iu ajn flughaveno (kie funkcias Ethiopian Airlines) al la flughaveno Kilimanĝaro (JRO) en Tanzanio (la rabato ne validas por tarifoj eventuale jam rabatitaj).

Por ĝui tiun rabaton oni devas aĉeti siajn biletojn per la jena ligilo (eblas aĉeti kaj unudirektajn kaj irrevenajn flugojn): https://www.ethiopianairlines.com/aa/event?Key=Esperanto-Universal-Kongress

UEA kuraĝigas ĉiujn interesatojn pri la 109-a UK veni al Aruŝo pere de tiu partnereco. La rekomendata dato por alveno en Aruŝon dependas, ĉu oni intencas partopreni aŭ ne en unu el la antaŭkongresaj ekskursoj (AK).

Por la 109-a UK estos tri eblecoj: AK1 (Naciaj Parkoj: Serengeti kaj Ngorongoro), AK2 (Tri naciaj parkoj – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire – plus vizito al la triboj hadzoj kaj datogoj) kaj AK3 (Tri naciaj parkoj en tri tagoj: Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire). AK1 kaj AK2 komenciĝos la 30-an de julio; AK3, la 31-an de julio.

Ĉiuj AK komenciĝos en Aruŝo, tial nepre necesas alveni en Aruŝon minimume la antaŭan tagon. Ĉiuj AK finiĝas ankaŭ en Aruŝo, la 2-an de aŭgusto, vendredon vespere, necesante almendi tranokton en la urbo en tiu tago (eblos mendi tiun kaj aliajn ekstrajn tranoktojn pere de la baldaŭa! peronta UK-mendilo).




Se oni intencas partopreni en unu el la postkongresaj ekskursoj (PK), la informoj por difini sian revenon hejmen estas la jenaj. La 109-a UK proponos

du eblecojn por PK: PK1 (Tri naciaj parkoj, samkiel AK3), de la 11-a ĝis la 13-a aŭgusto; kaj PK2 (Zanzibaro), de la 10-a ĝis la 15-a aŭgusto. PK1 komenciĝos en Aruŝo la tagon post la fino de la UK (pro kio necesos atenti mem mendi tranokton en Aruŝo por sabato, la 10-a). PK1 finiĝos la 13-an de aŭgusto en Aruŝo, do alhejma vojaĝo de tie estu ekde la 14-a de aŭgusto (kun neceso mem mendi tranokton por la 13-a kaj plu, se oni intencas mem resti pli longe en Aruŝo). PK2 komenciĝos sabaton, la 10-an, per flugo de Aruŝo al Zanzibaro, post la fino de la UK, do posttagmeze, kaj finiĝos la 15-an de aŭgusto vespere. Ekskursa! noj povos elekti fini:

a) per flugo de Zanzibaro revene al Aruŝo;
b) per flugo al Daresalamo anstataŭ Aruŝo;
c) aŭ tute sen flugo de Zanzibaro, se oni deziros mem resti pli longe en Zanzibaro. La prezo de PK2 inkluzivos ĉiujn transportojn, inkluzive de flugo(j) al(de) Zanzibaro.

Se oni intencas partopreni nur dum la kongresa semajno, alvendato devus esti la 2-a (aŭ la 3-a de aŭgusto matene) kaj revendato ekde la 10-a posttagmeze. Estos diversaj opcioj por ekskursi dum la UK, inter ili tuttagaj ekskursoj: E1 (Termofontoj Kikuletwa, tribo ĉaĝoj kaj kafplantejo), E2 (Serpenta Parko Meserani, akvofaloj Osupuko kaj kafplantejo), E3 (Ngorongoro), E4 (Tarangire), E5 (Lago Manyara), E6 (Nacia Parko Aruŝa), E7 (Masaja Vilaĝo kaj Ĝirafa Centro), E8 (Rigardo al Kilimanĝaro kaj vizito al naturrezervejo Sanya Juu), E9 (Kilimanĝaro: itinero
Marangu kaj tendaro Mandara); kaj duontagaj ekskursoj: D1 (Nacia Muzeo de Aruŝo kaj Artista Strateto), D2 (Centro de la Afrika Kultura Heredaĵo), D3 (Muzeo de Tanzanitoj), D4 (Masaja Merkato), D5 (Masaja Festivalo).

Plenaj kaj definitivaj detaloj pri la ekskursoj kaj hoteloj mendeblaj aperos en la Dua Bulteno, sed surbaze de la supraj informoj jam eblas plani kaj aĉeti venon al Aruŝo por tiuj, kiuj interesiĝas pri partopreno en ekskursoj. Kilimanĝaro (JRO) estas la ĉefa internacia flughaveno, kiu servas al Aruŝo. Aldone estas la loka flughaveno Arusha (ARK). Same aperos la kongresa mendilo. Ni afable memorigas, ke la 2-a aliĝperiodo de la UK daŭros ĝis la 31-a de marto 2024. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ne maltrafu la okazon facile aliĝi, daŭre kun rabato, per nia reta aliĝilo: https://uk.esperanto.net/2024.

Aparte en 2024 donacoj estos grava por garantii la ĉeeston de granda nombro da aktivuloj el Afriko. Eblas donaci per la Fondaĵo Afriko: https://uea.org/alighoj/donacoj/afriko (aŭ rekte dum la aliĝo al la UK).

El Gazetaraj Komunikoj de UEA
N-ro 1161
2024-03-17

# ALVOKO

## Kontribuu al la kongresa temo de la 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio : Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo

Dum la 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio, inter la 3-a kaj la 10-a de aŭgusto 2024, la kongresanoj diskutos pri "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". Tiu temo ebligos al kongresanoj diskuti pri la signifo kaj apliko de tri agadkolonoj de UN; pri la situacio de indiĝenaj kaj minoritatigitaj lingvoj; pri la situacio de virinoj, junuloj kaj aliaj minoritatigitaj grupoj en la mondo; kaj pri necesaj paŝoj kaj solvoj por daŭripova evoluigo de niaj socioj kaj la flegado kaj plibonigo de niaj medioj kaj de nia mondo, komuna hejmo de la homaro.




Ni invitas ĉiujn esperantistojn lertajn pri la temo «Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo» proponi prelegon kaj aktivaĵojn por la 109-a UK.

La reĝisoro de la kongresa temo en 2024 estas François Hounsounou, veterana esperantisto kaj instruisto el Benino. Aldone, li kalkulos je la helpo de tri vicreĝisoroj: Espoir Kasati por la subtemo "Lingvo"; Miora

Raveloharison por la subtemo “Homo”; kaj Cyprien Guiya, por la subtemo “Medio”.

Por kontakti la reĝisoron pri la kongresa temo, skribu al la malfermita diskutlisto
kongresatemo@groups.io – interesatoj ankaŭ povas aktive partopreni en ĝi - aŭ private al hounfranc1@yahoo.com.

Ni ankaŭ forte konsilas al ĉiuj kandidatoj legi pli pri la kongresa temo ĉe uea.org/gk/1153a1

**Loka Kongresa Komitato**

# AL MONTO-GRIMPANTOJ




Ĉu vi jam grimpis Kilimanĝaron ĝis la pinto de Afriko?
Ĉu vi ŝatus profiti la viziton al Tanzanio grimpante la monton?
Bv ne maltrafi belajn rakontojn kaj klarigojn pri grimpado fare de du esperantistoj kun la esperanta flago ĝis la pinto de Afriko.

Se vi bezonas fari grimpadon antaŭ la antaŭ kongresa ekskurso ĝis la pinto de Kilimanĝaro, bonvolu kontakti la LKK-n skribante ĉe esperantotz@gmail.com
La grimpado komenciĝos la 22a ĝis 28a de Julio 2024

# Internacia Infana Kongreso




Jam eblas aliĝi al IIK – Infana-adoleskanta kongreseto, kiu okazos en Aruŝo samtempe kun la Universala Kongreso!
Dum la Kongreseto estas planataj multaj aktivaĵoj – ekzemple : trezorserĉado, artaj atelieroj, subĉiela teatreto, ekskursoj, kaj instruado de Esperanto.
Eksciu pli ĉe https://iik.uea.org !

**Loka Kongresa Komitato**

# LA DUA BULTENO DE LA 109-A UK EN ARUŜO HAVEBLAS RETE.

La Dua Bulteno de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3-10 aŭgusto 2024) haveblas rete en la paĝo de la UK: https://uk.esperanto.net/2024/duabulteno.

La Dua Bulteno donas utilajn informojn pri la lando kaj la kongreso (alveno, kongresejo, temo kaj unua rigardo pri la programo), sed, plej grave - prezentas mendeblajn servojn de la UK, kiel hotelojn kaj ekskursojn. En la paĝo de la UK disponeblas kaj foliumebla versio, kaj la elŝutebla PDF-versio (10 Mb).

**Esperanto en Afriko**

La antaŭkongresaj ekskursoj estas planataj tri - ĉiuj kiel safariaj vojaĝoj - kaj ĉiuj celas prezenti la belecon de la tanzania naturo kun la sovaĝe vivantaj tieaj bestoj. Cetere, ĉu vi sciis, ke origine la nomo safario (safari) signifas "vojaĝo" en la svahila?

La unua ekskurso “Naciaj Parkoj: Serengeti kaj Ngorongoro “okazos inter 30.7.-2.8.(4 tagoj / 3 noktoj). Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos du naciajn parkojn – Serengeti kaj Ngorongoro.

Serengeti estas la plej konata nacia parko, fama pro abundeco de bestoj kaj pitoreskaj pejzaĝoj. Ĉi tie vi havos la ŝancon vidi la bestojn de la “La granda kvinopo” (“Big 5”) – leonojn, rinocerojn, leopardojn, elefantojn kaj bubalojn. Ni esperas, ke vi vidos ilin ĉiujn! En ambaŭ parkoj estas ankaŭ aliaj bestoj kaj riĉa flaŭro.

La dua ekskurso “Tri naciaj parkoj kun vizito al triboj” okazos 30.7.-2.8.(4 tagoj / 3 noktoj). Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno. En la parkoj oni veturos per specialaj terenaj aŭtoj kaj havos la ŝancon vidi multajn bestojn – ekz. bubalojn, ĝirafojn, leonojn, elefantojn, simiojn, zebrojn. Aldone vi vizitos setlejojn de du tanzaniaj triboj – hadzoj kaj datogoj – kaj ili konatigos vin kun sia riĉa kulturo kaj tradicioj.




La tria (malpli longa) ekskurso “Tri naciaj parkoj en tri tagoj” okazos 31.7.-2.8.(3 tagoj / 2 noktoj).

Tiu ĉi safaria ekskurso similas al AK2, sed estas unu tagon malpli longa kaj ne enhavas viziton de tanzaniaj triboj. Dum tiu ĉi ekskurso vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno.

La postkongresaj ekskursoj proponos du malsamajn celojn - depende de la gusto de la

kongresano: la unua okazos inter la 11-a kaj 13-a de aŭgusto 2024 (3 tago j /2 noktoj) kaj ĝi ripetas la antaŭkongresan ekskurson AK3. Dum ĝi vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire.

Por la longa postkongresa ekskurso ni invitas vin viziti fabelan Zanzibaron – insularon en Tanzanio, faman pro siaj belegaj ripozlokoj ĉe la maro. La programo enhavas kaj interesajn ekskursojn, kaj sufiĉe da libera tempo por povi plaĝumi kaj ripozi post la intensa kongresa semajno. Ĝi okazos inter la 10-a kaj 15-a de aŭgusto 2024 (6 tagoj / 5 noktoj). La antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn necesas mendi ĝis la 30-a de aprilo 2024 per la reta mendilo. Per ĝi ankaŭ eblas mendi loĝadon kaj dumkongresajn ekskursojn (mendo de la bankedo ankaŭ aperos baldaŭ). Ĉiu kongresano ricevas al sia retpoŝtkesto personan ligilon por la reta mendilo.Bonvenon al Aruŝo! Tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la 109-a UK, povas tion fari per https://uk.esperanto.net/2024/. Kaj por resti regule informita vizitu la UEA-paĝon ĉe Facebook: https://www.facebook.com/universala.esperanto.asocio.

# AGADO EN KONGO DR

## VIRINOJ EN KINŜASO

Virinoj membroj de la Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) celkonsciaj akceli ĉi tiun lingvon kaj etendigi ĝin tra Demokratia Respubliko Kongo. “Ni havas entuziasmon kaj estas deciditaj influi aliajn virinojn lerni Esperanton kaj vastigi ĝian uzadon en la lando konsiderante la avantaĝojn, kiujn ĝi donas al siaj parolantoj”, diris membroj de ĉi tiu asocio, okaze de la fermo de la virina monato.

La sinjorinoj el iuj kluboj en Kinŝaso esprimis la deziron perfektigi sian lingvokonon kaj kelkaj novaj neesperantistaj virinoj forte deziris lerni ĝin kun granda pasio.

En mia alparolo, kiel la Prezidanto de Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA), mi instigis la sinjorinojn de nia lando stari firme kaj montri decidemon kaj regi ĉi tiun lingvon. "Mi do kuraĝigas vin, karaj sinjorinoj kaj vi genraj viroj, ĉeestantaj ĉe ĉi tiu ferma ceremonio por la monato marto, alfaru via ĉi tiun universalan lingvon, kiu malfermas la pordon al diversaj kontaktoj tra la mondo.




Esperanto malfermos vin al la mirindaĵoj de la mondo, kiujn vi neniam suspektis, mi sugestis. En tiu sama okazo, S-ro. Mata, la unua vicprezidanto de DKEA, donis mallongan Esperanto-lecionon aprezitan de la partoprenantoj en la renkontiĝo.

Poste,  la rondo de prezentado de la partoprenantoj, la parolo estis donita al pastrino **Péniel Kikunda,** kiu enfokusigis sian mesaĝon pri la Evangelio de MATEO en ĉapitro 5, verso 13.

Ĉi tiu admono estis markita. momento de intensa preĝo por nia kara lando, kiu estas viktimo de Ruanda agreso, por Ukrainio kaj por Palestino kiuj ankaŭ estas en milito.

Ni rimarku, ke ĉi tiu kunveno sabate la 30-an de marto 2024 malfermiĝis kaj fermiĝis per la preĝo de la unua vicprezidanto, s-ro Remond Mata Matumona.

# AFRIKA KONGRESO DE VIRINOJ

**2-a Afrika Kongresa de Virino (2-a AKVo)**

**30-31an Juilo kaj 01an de Aŭgusto 2024, Aruŝo Tanzanio**

Ni ĝojas alvoki vin ĉiujn karajn fratinojn. Ni organizas nian unuan Internacian Virinan Kongreson kaj la duan Afrikan Kongreson de Virino en Aruŝa Tanzanio la 30an, 31an de Julio kaj 1-an de Aŭgusto 2024.

Nia Temo estas « Virinoj : Leviloj de daŭrigebla disvolviĝado ». Tiu ĉi temo emfaza la ideon pri investo en la subteno kaj trenado de virinoj estas disvolviĝa levilo por lando kaj kontinento. Dum la kongreso estas planataj multaj aktivaĵoj. Ekzemple : kundividaj spertoj, prelegoj, artaj atelieroj, ekskursoj kaj instruado de Esperanto, trejnado, kunlerni Afrikandancon, kuirado, internacia vespero. Ni atendas vin karaj amikinojn.

## PRI NIA KOTIZO :

| Kun loĝado | Ĝis la 30-a de aprilo 2024 | Ĝis la 30-a de majo 2024 | Ĝis la 1-a de julio 2024 |
|---|---|---|---|
| A-Landoj | 230 | 240 | 300 |
| B- Afrikaj landoj | 150 | 180 | 200 |
| **Sen loĝado** | **Ĝis la 30-a de aprilo 2024** | **Ĝis la 30-a de majo 2024** | **Ĝis la 1-a de julio 2024** |
| A-landoj | 155 | 170 | 200 |
| B- Afrikaj landoj | 100 | 110 | 120 |

La kotizo kovras la kostojn de loĝado (se indikite), ĉiuj manĝoj, programoj dum la kongreso, kaj ekskursa transporto.
Por aliĝi, bonvolu plenigi la aliĝilon kaj sendi ĝin per retmesaĝo al :

- Alexandrine Omba : alexandrine.omba7@gmail.com
- aŭ Miora RAVELOHARISON le.myrhe@gmail.com

Por pagi, bonvolu ĝiri al UEA- Konto « rshr-s ». kiel pagocelo skribu « Virina Kongreso » kaj vian nomon.

**Venu kun ni, nia renkontiĝo estos en Aruŝa!**

**ALIĜILO Al la**

**1-a Virina Kongreso**

**2-a Afrika Kongresa de Virino (AKVo)**

**30-31an Juilo kaj 01an deAŭgusto 2024, Aruŝo Tanzanio**

Adresse e mail:.......................................................................................

Familia nomo: ..................................Persona nomo:................................

Naskigdato :...............................................................................................

Adreso:.......................................................................................................

Lando:... ......................................................................................

Telefono..................................retadreso................................................

Mi mendas ĉambron (en hotelo): unu-litan ☐ du-litanan ☐

Mi preferas loĝi kun la alia en kongresejo :

Nivelo en Esperanto :

Komencinta :...........Progresanta : ...........Flua : .......................................

Organizaj informoj :

Mi estas veĝetarano : JES / NE

Mi postulas (specialajn dezirojn) : .....................................................

Mi povas kontribui al la programo ( kundividaj spertoj, prelegoj, artaj atelieroj, instruado de Esperanto) :....................................................
Bonvolu Sendi ĝin al :
E-mail : Alexandrine Omba alexandrine.omba7@gmail.com aŭ Miora Raveloharison le.myrhe@gmail.com

**Subskribo**

Miora RAVELOHARISON

# KRISTANA SEMINARIO EN MADAGASKARO

La Kristana Seminario-Esperanto okazis de ĵaŭdo la 7a ĝis sabato la 9a de marto 2024 en la gastigejo de la MAMRE FJKM en Sabotsy



Membroj de AME

Namehana. MAMRE FJKM estas Asocio de la fratinaro el la reformisma protestanta eklezio FJKM. Sabotsy Namehana situas je deko da kilometroj norde de Antananarivo. Nia ĉefa celo estas refunkcii nian Kristanan Esperanton-agadon en Madagaskaro. Ni havas du asociojn: AME, la sekcio de KELI kaj MUKE, la sekcio de IKUE. AME estas Asocio de Malagasaj Evangelianoj kaj MUKE estas Malagasa Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj. Nia seminario fokusis sur la temo « Vizioj por pli bona mondo». Partoprenis ĝin entute 43 kristanoj el kvar kluboj - la Esperanto-Klubo de Analamahitsy, la Verda Insulo de

Esperanto (Anosibe), Itaosy Esperanto-Klubo, Sunleviĝo Moramanga - kaj Ulrich Matthias el Germanio. La partoprenantoj tranoktis kaj manĝis surloke.

## Nia programo

1. Kunpreĝadoj kaj prelegoj :

Ni komencigis nian seminarion per la ekumena meso gvidita de Pastorino Miora RAVELOHARISON. Kelkaj geesperantistoj partoprenis la preĝojn, legadon de la Biblio. La Diservo fokusis sur la parolo de Jesuo « Pacon al vi » en Johano 20 :19b. Por fermi nian seminarion, ni havis ekumenan meson gvidita de Pastorino Miora RAVELOHARISON.



2. Kelkaj geesperantistoj partoprenis la preĝojn, legadon de la Biblio. La Diservo fokusis sur la parolo de Jesuo en Johano 13 : 34,35; povas ami unu la alian kaj ni dividas ĝojon kaj ni havis komunan dankpreĝon ĉiumatene kaj Virinoj en la Kristana Seminario ĉiuvespere, gviditaj de partoprenantoj.



Ĉiuj sekvis la prelegon de Ulrich Matthias pri «vizio por pli bona mondo». Tiu prelego motivigis niajn gejunulojn agadi por havi bonan mondon. ...Ni preĝis kune la „Simpla

Preĝon“ atribuatan al Sankta Francisko el Asizo. La dua tago, Pastorino Miora Raveloharison instruis la temon „Tiuj kristana volas ŝanĝi la mondon, kiuj havas profundan rilaton kun Dio per preĝado“



3. Lernado de kantoj, plivigligado kaj Lingvoinstruado per diversaj ludoj kaj eskurso La partoprenantoj kunlernis ok kristanaj kantojn parte el Adoru, kaj parte tradukitajn el la malagasa lingvo. Ulrich kaj Miora tradukis ilin kaj instruis al ĉiuj partoprenantoj.

Ni kune ĝojis kanti kaj kune danci por la Gloro de nia Dio. Ni plivigligis nian seminarion per ludoj en la salono kaj en la korto. Ni instruas Espeanton per tiuj diversaj ludoj.



*Virinoj en la Kristana Seminario*

Ni havis ekskurson en la dua tago. Ni vizitis la praulan kaj reĝan kultejon kaj palacon. Kelkaj homoj, vidinte nin kun la T-ĉemizo, demandis nin pri Esperanto. Eĉ kelkaj neesperantistaj vizitantoj Ĉinio prenis foton kun ni por bona rememoro kun nia grupo. Ĉiuj partoprenanto sentis, ke la etoso estas tre amuza kaj ĝoja, tre varma, amika kaj paca. Ĉiuj estas fieraj de nia lingvo Esperanto. Nia celo de tiu Kristana Seminario estis refunkciigi nian Kristanan Esperanton-agadon en Madagaskaro. Tial ni havis tempon por la balotado de la estraranoj de AME kaj MUKE. La katolikaj esperantistoj akceptis tiujn novajn estraranojn de MUKE:



honora membro estas Ranja Arc Lydie ZAFINIFOTSY, la prezidantino estas Haliarinoro RAVONIARIMANANA, kaj ĉiuj elektis Raymonde Victorine ANDRIAMASINORO kasistino. La sekretariino nomiĝas Lahitriniaina Mampionona RANDRIANAVALONA.

La protestantanoj kunsentis kaj elektis jenajn estraranojn de AME : honora membro estas Pastorino Miora RAVELOHARISON, Nathan HERINIAINA kiel prezidanto, RAHARISOA sekretariino kaj Torine Tatiana RAVOLOLOMAMPIONONA kasistino.

La organizantino provizis al tiuj, kiuj mendis ĝin, ilian respektivan T-ĉemizon. « Jesuo en mia koro » estis skribita en la antaŭa flanko kaj « Pacon al vi » Johano 20:19b en la dorso de nia T-ĉemizo.

Ĉiuj partoprenantoj kunvivis amike kaj pace en tiu seminariejo. Ni ĉiuj volas ŝanĝi nian mondon sub la gvidado de nia Jesuo. Ĉiuj partoprenantoj pretas por bona mondo plena de paco. Danke al tiu evento, ni povis refinkcii niajn kristanajn sekciojn, kiuj partoprenos gravajn taskojn pri la movado de Esperanto en nia lando. Ni planas havi tiun kristanan seminarion ĉiujare en Madagaskaro kaj deziras ricevi subtenon de vi. Ni ĉiam pretas kunlabori kun vi, ne nur por la disvastigo de Esperanto sed ankaŭ por la kreskigo de nia kristana movado. « Kaj mia Dio satigos ĉian vian bezonon, laŭ Sia riĉo en gloro en Kristo Jesuo» Filipianoj 4 :19

**Miora RAVELOHARISON**

# KLERIGA PRELEGO DUM KLUBA VIVO

Kluba vivo estas programero organizata de la Komisiono de TEJO pri edukado kaj celas trejni, lertigi, motivigi, altniveligi junajn esperantistajn intruistojn por ke tiuj lastaj povu fariĝi bonaj instruistoj. Plie, ĝi gvidi tiujn instruistojn al pli bona organizado de siaj ĉeestaj ak retaj lerno-klasoj

## Kia estas bona instruisto ?

**Prelegis  Mireille Grosjean**

Jen la resumo de la prelego :

Se temas pri instruisto pri lingvo, la kapabloj pri tiu lingvo devas esti altnivela.

**Estas 3 ecoj, 3 aspektoj**

**UNUE** : Bona instruisto devas havi **SCIOJN**

Kompreneble oni povas trovi sciojn en libroj kaj en la Reto, sed pli bone havi iom da stoko en la memoro.

**DUE** : Bona instruisto estu **INTELIGENTA**

Kapablo analizi, sintezi, dedukti, kompari, resumi.

Kapablo senti la homojn, la etoson, la instruisto ankaŭ havu sociajn kapablojn.




**TRIE** : Bona instruisto devas esti bona **PEDAGOGO**

1. Kapablo percepti la lernsituacion, konsideri ĝin, adaptiĝi al ĝi.
2. Kapablo prepari kaj prezenti salteblajn paŝojn por ĉiuj lernantoj.
3. Kapablo konstrui varian kurson kun legado, skribado, aŭskuldato, parolado, ekzercado, kantado, teatrado, ludoj, en bona ekvilibro.
4. Kapablo paki la lernendajn paŝojn en amuzaj kaj maltedaj kursoj.
5. Memfido, kiel roko meze de rivero.
6. Doni plenan atenton al la grupo. Oni koncentriĝu pri « Ĉi tie kaj nun ».

**Esperanto en Afriko**

7. Kapablo respondi al diversaj demanoj tamen GVIDI kiel kapitano, mastrumi la tempon kaj la temon.
8. Kapablo respekti la lernantojn. Fini la programon (en kazo de deviga lernado), alveni akurate, aspekti dece...
9. Kapablo klare kaj pozitive komuniki.
10. Havi entuziasmon kaj karismon por tiri la lernantojn al sukceso (lernado, kresko de motivigo).

La tasko de la instruisto ne estas plaĉi al la lernantoj. Ĉiam kelkaj lernantoj ne ŝatas la personecon de la instruisto.
Nun imagu senscian homon pedagogie tre dotitan...
... inteligentan homon ne pedagogiaj kapabloj....
... inteligentan homon sen scioj...
Ekzistas !!!
Bona instruisto devas esti mezbona, bona aŭ tre bona en la 3 kampoj. Ne povas esti truo.
Temas pri giganta defio !!!
Instruado rilatas al loka kulturo.
Ne eblas kopii elstaran instruiston. Ĉiu devas trovi sian stilon. Kiel ganto.
Tamen sperto-interŝanĝoj tre valoras.
Por tio ni havas antaŭ ni iom da tempo...
La ĉefa rolo de instruisto estas NUTRI LA MOTIVADON de la gelernantoj. La motivado estas motoro, kiu bezonas benzinon.
Por reveni al nia temo : ni ĉiuj estas lernantoj, ni daŭre estas en lernado.
Vidu Grundtvig ! Li estis dano kaj insistis pri « Lernado dum la tuta vivo ». Pri lingvoj oni neniam povas ĉion scii.
Majstri lingvon ne eblas. Mi plurfoje monate lernas novajn vortojn en la franca, kiu estas mia
denaska lingvo. Same pri instruado : neniam iu povas diri : nun mi instruas perfekte. Majstri

instruadon ne eblas.

El « Faktoj kaj Fantazioj » (laŭ-memore): lerni kun instruisto, kiu asertas, ke li/ŝi majstras ĉion, similas al trinki malpuran akvon de verdeca lageto ; lerni kun instruisto, kiu daŭre esploras kaj provas progresi, similas al trinki el pura rivereto.

***Esperanto en Afriko*** iĝis dumonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Espoir Ngoma Kasati, B.P. 1023, Lubumbashi, DR. Kongo; tel.: +243 972 716 042

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *espoirkasati@gmail.com*.

**Limdato por la 50-a n-ro:** la 4 -a de Majo 2024

**Membroj de la Afrika Komisono (2022-2025) :**

S-ro Aimé-patrick MANIRAKIZA, **Burundo**

S-ro Koffitche Koufionou, **Togolando**

S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**

S-ino Ranja Robertine jean d'Arc Zafinitotsy, **Madagaskaro**

S-ro John E. Magessa, **Tanzanio**

S-ro Espoir Ngoma Kasati, **DR Kongo**